
リングの唄

Kanto de pomo

大崎信久 / Ōsaki Nobuhisa

私は長期療養と治療のために入院しておられるお年寄りの元を定期的に訪ねています。こちらの病院では、午前中は患者さんのおられるお部屋を1つずつまわり、重症部屋を除くすべての方と挨拶を交わして行きます。多くの場合、ここで込み入った話に発展して、興味深いことを耳にしたりします。そして午後からは職員が行うレクレーションのお手伝いをします。季節の行事にお化粧品（療法）や句会、ゲームなど趣向を凝らした日替りメニューがそろっています。実はこの時間を借りて、月に一度のペースで法話会をさせていただいています。

さて、平成13年12月末、私はある方の過去を垣間見ました。この方とは比較的よい関係ができつつあり、気軽に声を掛け合うようになっていました。その日は週に2度あるカラオケの日でした。特に年末ということで忘年会を兼ねた企画になっていて、カラオケ会場には早々に40名が集まっておられました。あらかじめ用意された歌詞カードに目をやり、鼻歌交じりに手慣れた調子でお好みの曲をリクエスト。そして、それぞれが紅白に別れて自慢の喉を競い合いました。後でリクエストされたご本人には、選曲の理由や歌われた感想をお聞きすることになっていました。ここではさまざまな人生の経験談が披露されます。どの話も興味深く、いつまでも聞いていたいという

Mi frekventas maljunulojn, kiuj estas en hospitalo por resanigo dum longa tempo. Antaŭtagmeze mi vizitas ĉiun ĉambron de malsanuloj kaj salutas ilin ĉiujn escepte de gravaj malsanuloj. Ofte la interparolo eniras en komplikaĵon, kaj mi aŭdas interesajn aferojn. Posttagmeze mi helpas la oficistojn por aranĝi distrajn programerojn: sezona festo, kosmetika terapio, hajka kunveno, ludo kaj aliaj interesaj programeroj ĉiutage alternas. Uzante tiun tempon mi okazigas la kunvenon de dharma parolo unu fojon en ĉiu monato.

En la fino de decembro, 2001, mi rigardetis la pasintecon de iu sinjoro. Kun li mi havis iom post iom bonan rilaton kaj interparolis facilokore. Estis la tago de karaokeo, kiu okazas du fojojn semajne. Ĉar estis jarfino, la aranĝo estis ankaŭ por jarfina festo. En la kunvenejo jam kolektiĝis 40 homoj. Ili vidis tekst-karton de karaokeo kaj zumkante mendis de si ŝatatan kanton. Ili dividiĝis en du grupoj kaj konkurencis inter si je sia kantotekniko. Poste oni demandis ilin, kial ili preferis la kanton, kiel ili sentis post kantado. Ĉi tie montriĝas diversaj spertoj dum vivo. Ĉiu ajn parolo estas interesa. Mi eĉ volis aŭskulti ilin por ĉiam. Mi prezentu al vi unu aferon neforgeseblan, kiu okazis en tiu

気持ちになります。今回はその日に出くわした忘れられない出来事を紹介いたします。

いよいよ歌合戦は始まりました。いつもと同じように軽快にリクエスト曲が流れていきます。歌い上げて満足そうな表情が見て取れます。私も手持ちのハーモニカで、何曲か伴奏を買って出させていただきました。そうして何曲かにぎやかに歌い進んでいると、突然ある男性が立ち上がり会場を足早に、しかも表情を隠し避けるように自室へ。私は演奏を終えるとすぐに後を追いかけてきました。彼は自室から冬の冷たい景色を窓越しにずっと見つめているばかり。

そのとき演奏した曲目は「リンゴの唄」でした。これはだれもが知っている戦後を代表する曲。この歌に随分と心が暖められたという話を聞くことができます。そのせいか多くの患者さんはより明るく手拍子を打ち、どこか昔をなつかしまれる表情さえ伺えました。それだけに彼の取った行動は印象的だったのです。だから追いかけたのでした。やがて彼は、ゆっくり語りはじめられました。

---戦中、南方をさ迷うように転々とし、いつのまにか終戦を迎えていた。戦友は次々と銃弾に倒れ、いやそれ以上に病気で命を落とす。そんな苛酷な環境を何とかくぐり抜け復員した。長崎港発の列車には、乗り切れないほどの人がさらに積み重なるように乗り込んだ。広島、大阪で乗り継ぎようやく帰郷。そして見たものは焦土と化した本土、ではなくて、こ

tago.

Jen komenciĝis la kantokonkurenco. Kiel kutime, leĝere fluas melodio de mendita kanto. Tiuj, kiuj finis kantadon, montras kontentan mienon. Ankaŭ mi servis al ili per akompanado de mia buŝharmoniko por kelkaj kantoj. Dum tiel vigle iranta kantodo iu viro subite stariĝis, rapide forkuris el la kunvenejo kaj eĉ kaŝante sian mienon fuĝis en sian ĉambron. Post la fino de mia akompanado mi tuj sekvis lin. Li nur gapis al vintra malvarma sceno tra la fenestro de sia ĉambro.

Tiam ludita muziko estis "Kanto de Pomo." Tiu ĉi estas de ĉiu ajn konata muziko reprezentante la postmilitan Japanion. Foje oni aŭdas, ke la kanto varmigis koron. Do multaj malsanuloj pli ol kutime gaje manfrapis kaj eĉ montris mienon sopiranta la pasintecon. Des pli impresanta estis lia konduto. Pro tio mi sekvis lin. Li post kelka tempo komencis paroli malrapide:

--- Dum la milito mi vagadis tien kaj reen en la suda fronto; iam finis la milito. La kruelan situacion, ke amikoj unu post la alia mortas pro malsano pli ofte ol falas de kugloj, mi iel tiel transvivis kaj revenis al Japanio. Mi kaj multege da homoj envagoniĝis en Nagasaki kvazaŭ sin faldante. En Hirosima kaj Osaka mi ŝanĝis trajnon kaj finfine povis atingi mian hejmon. Tie mi vidis, ne forbruligitan landon, sed gajan kantovoĉon, kiun mi ĝis

れまでに聞いたことのない華やかな歌声だった。多くの友人を失い、戦争が終わってもすぐには帰れなかった。しかも負けてどんな顔をして帰ればよいのかと真剣に考えた。「俺はこの戦争で何をしに行ってきたのか！ この変わりようはなんだ！」と。言葉にならない、やるせないみじめな気持ちに涙した。そして止まらなかった。それを思い出してしまった。----これが80歳を越えるこの方の20代の想い出。

私は今、ただ笑顔で歌っておられる彼の姿しか知らない。心にこびりついた過去の悲しみや、また苦勞を知る由もない。ただただ、今の彼の笑顔に精一杯、手拍子をおくるだけ。彼のすべてを知らないのは当たり前ではありますし、なつかしのメロディーに隠されたさまざまな体験や感情も想像しがたい。それ故に返す言葉を失ってしまいました。それでも、その時この瞬間、私は僧侶として、いいえ、人間として何ができるのだろうかと思ひ返りました。そしてどのように寄り添うべきだったのかを真剣に悩みました。

数日後、彼はマイクを握り、楽しそうに歌っていました。あのリンゴの唄を。



tiam neniam aŭdis. Perdinte multajn amikojn mi ne povis reveni al Japanio post la milito. Mi serioze enpensigis, kun kia vizaĝo mi venkita povus reveni. Sed... "Por kio mi iris al batalkampo! Kio estas tiu ĉi ŝanĝiĝo!" Venis al mi ne vortoj sed nur larmoj pro senkonsola kaj mizera sento. Miaj larmoj ne haltis. Tion mi nun rememoris. ---- La sinjoro pli ol 80-jaraĝa ĉi tiel rakontis pri sia rememoro de 20-jaraĝoj.

Nun mi nur scias lin, kiu ridetante kantas. Mi ne scias lian pasintan triston gluitan al lia koro nek lian malfacilaĵojn. Mi nur povas taktmezuri per manoj por lia ridetanta vizaĝo. Estas kompreneble, ke mi ne scias lian tuton; malfacilas imagi diversajn spertojn kaj sentojn kaŝitajn malantaŭ la karmemora melodio. Tial mi perdis respondan vorton. Sed ĝuste en tiu momento mi pensis, kion mi povas fari kiel bonzo, ne, kiel homo; mi serioze enpensigis, kiel mi devis sidi apud li.

Post kelkaj tagoj, li prenis mikrofonon en sian manon kaj kantis: la Kanton de Pomo.

